

AVINJO, KIOM AĜA VI VERDIRE ESTAS?

Mi eĉ ne antaŭsentas, ke mi jam estas tiel „maljuna“ memorulino.

Foje vespere la avinjo interbabilis kun sia nepo pri la samtempa vivo.

Subite la nepo demandis la avinon:

„Avinjo, kiom aĝa vi verdire estas?“

La avino respondas: „Lasu min momenton pripensi..!“

Mi naskiĝis antaŭ ekzisto de televido, kopiilo, kontaktaj lensoj, kontraŭabortigaj piloloj.

Ne ekzistis policaj radaroj, kreditkartoj, laserradioj.

Ankoraŭ ne estis inventitaj klimatiziloj, eĉ ne sekigiloj, la vestaĵojn oni lavis kaj pendigis sur freŝan aeron, por ke ĝi sekiĝu.

La homo ne estis sur la Luno, ne ekzistis jetaj aeroplanoj.

Mi edziniĝis al via avo, ni kune vivis, en ĉiu familio estis la patrino kaj la patro.

Viroj ne portadis orelingetojn.

Mi naskiĝis antaŭ ekzisto de komputiloj, paralela studado kaj grupa terapio.

La homoj ne venadis al preventaj kontroloj, sed la kuracisto ilin laŭbezzone sendis por kontrolo de sango kaj urino.

Ĝis mi ne atingis 18-jaraĝon, mi ĉiun viron titolis „Sinjoro“ kaj la virinon „Sinjorino“ aŭ „Fraŭlino“.

Kiam tiutempe la virino entramiĝis aŭ enbusiĝis, la infanoj kaj junaj homoj rapidis, por liberigi sidlokon.

Se ŝi estis graveda, ili akompanis ŝin ĝis la sidloko.

Sur la ŝtuparo oni lasis al virinoj la flankon ĉe manrelo, ili eniris lifton kiel unuaj.

La viroj neniam salutis la virinon sen ekstaro, se ili sidis en la momento, kiam ŝi eniris.

Ili ĉiam ekstaris el ĉetabla sido, kiam ekstaris la virino, eĉ se tio estus nur por la momento.

La viroj al ni malfermadis la pordon kaj helpadis ĉe depono de la manteloj.

Junulinoj signifis por sia familio honoron.

Nia vivo direktiĝis per realisma pri-

pensado, per estimo al pli aĝaj homoj, per laŭleĝa kondukado, plenis ĝin fruktodona kunvivado kun ceteraj homoj kaj respondecata libereco.

Oni instruadis nin distingadi bonon de la malbono.

Serioza rilato signifis, ke ni havas bonajn interrilatojn kun niaj gefratoj kaj kun pluaj pli malproksimaj kaj pli proksimaj parencoj kaj geamikoj.

Ni ne konis sendrotajn telefonojn, nek la poŝtelefonojn.

Ni ne aŭskultadis stereajn sonregistraĵojn, ultrakurtajn radioelsendojn, sonkazetojn, kompaktnajn diskojn, kaj ni ne havis elektronikajn skribmaŝinojn, komputilojn, notblokajn komputilojn. „Notebook“ signifis kajeron...

Horloĝetojn ni streĉis ĉiutage.

Nenio estis diĝita, eĉ ne la horloĝetoj, la hejmaj aparatoj ne havis ekranan vidigilon.

Kiam ni jam parolas pri maŝinoj, ekzistis nek monaŭtomato, mikroonda forno, vehkorloĝo kun radioaparato.

Pri videoregistriloj kaj videodetektiloj eĉ ne indas paroli...

Ekzistis nek koloraj nek diĝitaj foto-grafaĵoj, nur nigrablankaj, kaj por ilia pretigo oni atendis almenaŭ tri tagojn.

„Made in Korea“ aŭ Fabrikita en Ĉinio aŭ Tajlando tute ne ekzistis.

Ne ĉi ĉi aŭdis pri pico, Mc Donald aŭ pri instantkafo.

En la vendejo oni povis ion aĉeti eĉ por 5 aŭ 25 halerojn.

Glaciaĵo, vojaĝbileto aŭ refreŝiga trinkaĵo kostis 70 halerojn.

En mia tempo estis herbo io, kion ni FALĈIS, ne fumis!!!

Nun do diru al mi, kiom vi pensas, ke mi havas jaron.“

„Ho, la avinjo... pli ol ducent!“ respondis la nepo.

„Ne, karulo, nur sesdek!“ ■

Aŭtoro nekonata